La bonegaj rezultoj atingitaj per ĉi tiuj kibernetikaj metodoj rilate la preparon, organizadon kaj reguladon de la didaktika informo motivigis la grupon okazigi 1972, kunlabore kun la Ministerio pri Klerigado, renkontiĝon de fakuloj pri programita instruado, celante informi ilin pri la taŭgeco de la kibernetika metodologio. Dum tiu ĉi renkontiĝo d-ro Roberto J.Vernengo, profesoro de la katedro pri jura filozofio, prezentis sian koncernan sperton ĉe sia katedro; la alta lernindico evidentiĝas je la altnombre sukcesaj ekzamenrezultoj. - Prof.Luisa Kohen prezentis laboron pri teknikoj kaj stiloj en

programita instruado. - Dum la sama jaro aliĝis al la grupo profesorino Nora Levit de Golbert, kiu komencis studi la epistemologiajn fundamentojn de la kibernetika pedagogio.

La politikaj kaj registaraj ŝanĝoj en nia lando kaj sekve en nia universitata medio interrompis la disvolviĝantan taskon de la grupo, kiu tamen daŭrigis private sian agadon en konstanta rilato kun prof.d-ro H.Frank kaj ties instituto en Paderborn (D). Grava apogo tiurilate estis la decido de Ediciones Troquel, Buenos Aires, aperigi 1974 kaj 1976 la hispanajn tradukojn „Cibernética y Filosofía" (kibernetiko kaj filozofio) kaj „Introducción a la pedagogía cibernética" (enkonduko en la kibernetikan pedagogion), kiujn ellaboris Julio Balderrama el la germanlingvaj libroj de Frank (1969) resp. Frank/Meder (1971).

Dum sia vizito en la jaro 1981, kiam li estis invitita de la instituto Goethe kaj de la Sociedad Científica Argentina (Argentina Scienca Societo), d-ro Frank proponis al d-ro Máximo Valentinuzzi - la direktoro de la instituto pri kibernetiko de la menciita societo -, ke la Kibernetike Pedagogia Grupo agu estonte ene en tiu prestiĝa institucio. Tiamaniere la grupo ekdisponis pri ejo por daŭrigi sian laboron. Ĝi kunordigis sian agadon kun la grupo de Rosario kaj en la nuntempo esploras kaj aplikas la „Kurztest für allgemeine Intelligenz KAI" (mallonga testo pri ĝenerala inteligento) de d-ro Siegfried Lehrl (de 1981-1984 vicdirektoro de la Instituto pri Kibernetiko Berlin&Paderborn), por adapti ties parametrojn al la argentinaj kondiĉoj. Dum trimonata restado en la Instituto pri Kibernetiko en Paderborn profesorino Luisa Kohen estis studinta kaj diskutinta ĉi tiun metodon kun la germanaj fakuloj. Krome la grupo studas la filozofiajn kaj epistemologiajn fundamentojn de la kibernetika pedagogio kaj transprenis antaŭ nelonge la taskon, kapabligi kaj konsiladi la docentajn kuracistojn de la Centro Médico (medicina centro) de Mar del Plata pri la praktika aplikado de la kibernetike pedagogiaj metodoj.

3. La Rosaria Grupo pri Kibernetika Pedagogio.

La Kibernetike Pedagogia Grupo de la Universidad Nacional (nacia universitato) de Rosario (UNR) ekestis en 1979. Tiam estis invitita gvidi mallongdaŭran kurson profesorino Luisa Kohen, tiutempe profesorino de la Universitato de Buenos Aires. En la menciita kurso oni prezentis la metodologion de la kibernetika pedagogio kaj ĝian aplikadon por la ellaboro de didaktika materialo. Pro la tiel vekita intereso nova kurso okazis la sekvintan jaron; aldoniĝis scienc-psikologiaj fundamentoj. Tiel kreiĝis - kunordigata fare de prof.d-ro Juan Carlos Carena - interfaka grupo (el biokemistoj, pedagogoj, psikologoj, kuracistoj ktp.), kiu nomiĝis ek de la jaro 1980 „Kibernetike Pedagogia Grupo de UNR".

En la jaro 1981, invitita de ĉi tiu grupo, prof.d-ro Helmar G.Frank prelegis pri kibernetika pedagogio ĉe la Facultad de Ciencias Básicas (fakultato pri bazaj sciencoj) kaj ĉe la Facultad de Humanidades (prihomaj sciencoj) de UNR.

La Rosaria grupo kune kun tiu en Buenos Aires komencis en 1981 esploron pri mezurado de la inteligento pere de la mallonga testo pri ĝenerala inteligento KAI por trovi la parametrojn validajn por la argentina popolo. Unu el la unuaj adaptproponoj de KAI, kiu ekestis post esploro pri 50 kazoj (studentoj de UNR), estis la uzado nur de literoj, kies hispana nomo estas unusilaba, do la rezigno al la literoj

Z, X, J ktp. uzataj en la originala (germana) KAI (vd. Lehrl k.a., 1980). Tio ebligis la konstruon de serioj el 14 diversaj literoj de la tuta hispana alfabeto. (La legotempo de tiaj serioj ja devas ebligi la elkalkulon de la individua aperceptadrapideco, kiu estas komponanto de la inteligento.) Oni intencas disvastigi ĉi tiujn mezuradojn al aliaj popoloj kaj serĉi la proprajn baremojn. En la praktiko, la Rosaria Kibernetike Pedagogia Grupo analizas nuancojn de la argentina psikostrukturo, cele al la starigo de komparado kun la eŭropa.

La „Quintas Jornados Argentinas de Cibernética" (5-a argentina kibernetika labortagaro) en la septembro 1983 estis organizita en Rosario fare de la kibernetike pedagogia grupo kune kun la kibernetika departamento de UNR kaj la Sociedad Científica Argentina (argentina scienca societo). Ĝi permesis la prezenton de rezultoj atingitaj ĝis nun pere de la aplikado de KAI. Oni ankaŭ voĉlegis (post traduko el la Internacia Lingvo en la hispanan fare de Alicia S.Toffi) prelegtekston de d-ro H.G.Frank: „Ĉu la Inteligento estas mezurebla? Ĉu heredebla? "

Plie profundiĝis la scienca kunlaboro inter la Kibernetike Pedagogia Grupo de UNR kaj la Instituto pri Kibernetiko Berlin& Paderborn dum la marto 1984, kiam - invitita de UNR kiel gastprofesoro - d-ro Helmar G.Frank gvidis kvar kursojn (po du en ILo kaj en la germana, kun tradukoj hispanen) por pli ol 100 profesoroj, studintoj kaj profesiuloj. La - po 16horaj kursoj pritraktis propedeŭtikon de la prospektiva, precipe kibernetika klerigscienco, aplikon de kibernetikaj kalkuloj al la pedagogio, fundamentojn de la kibernetika psikologio kaj epistemologiajn problemojn de la kibernetiko. La kursoj malfermis en la UNR vojon al nova konsidero de la pedagogio, plifirmigis kaj solidigis la laborstrukturon de la Kibernetike Pedagogia Grupo kaj preparis la enirigon de novaj membroj.

Elhispanigis: Alicia Toffi

Literaturo:

BECKER-FRANK, S.W. (komp.): Instrucão Programada e Pedagogia Cibernetica. Editôra Mensageiro da Fe, Salvador-Bahia (BR), januaro 1970, 384 p.

CIRIGLIANO, G.F.J.: La instrucción programada. En: Revista de Facultad de Ciencias de la Educación de Paraná, 1963

FRANK, H.: Kybernetik und Philosophie, Berlin ^{2}1969, 190 p.

FRANK, H.; MEDER, B.S.: Einführung in die Kybernetische Pädagogik, München 1971, dtv, 204p.

LEHRL, S.; GALLWITZ, A.; BLAHA, L.: Kurztest für allgemeine Intelligenz KAI. Handanweisung. München-Watterstetten, 1980, Vless

Vías no convencionales de aprendizaje, Jornadas Adriano Olivetti de Educación, Ediciones Culturales Olivetti, Buenos Aires 1971

Ricevita 1984-05-26

Adresoj de la geaŭtoroj: Prof.Luisa Kohen, Araos 2744, Piso 9D, RA-1425 Buenos Aires
Prof.d-ro Juan Carlos Carena, Rioja 3003, RA-2000 Rosario

Kybernetische Pädagogik in Argentinien (Knapptext)

Programmierte Instruktion und Kybernetische Pädagogik tauchten im argentinischen Schrifttum gemeinsam erstmals auf (1963). 1965 konstituierte sich in Buenos Aires eine Gruppe für PI, die 1961-1973 eine Zeitschrift herausbrachte, 1970 den 1.Argentinischen Kongreß über PI organisierte, engen Kontakt zum Institut für Kybernetik Berlin&Paderborn hielt und seit 1981 ihren Sitz im Institut für Kybernetik der Sociedad Cientifica Argentina hat. Ihre interdisziplinäre Forschungs- und Entwicklungsarbeit wird vor allem von N.P.deAcosta, L.Kohen und S.A.deMilanesi getragen. Sie initiierte 1979 die Gründung der kybernetisch-pädagogischen Gruppe in Rosario unter J.C.Carena, die vor allem auf informationspsychologischem Gebiet (Adaption des Intelligenztests KAI) arbeitet.

Mitteilungen * Sciigoj * News * Nouvelles

Georg Meier wird 65

Am 20.November 1984 feiert Prof.Dr. Georg MEIER, Humboldt-Universität Berlin, seinen 65. Geburtstag und wird emeritiert.

Der Jubilar übernahm 1959 die seit 1946 erscheinende „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung" (ZPSK), deren Redaktion er nach 25jähriger ehrenamtlicher Tätigkeit ab dem Jahrgang 1984 an die Akademie der Wissenschaften abgab. Er gehört auch zu den Autoren und Beratern der grkg/Humankybernetik.

In der letzten von ihm betreuten Nummer seiner weltweit angesehenen Fachzeitschrift (Heft 6/1983) ließ Meier erstmals Knapptexte in ILo erscheinen. Bekannt geworden ist er in erster Linie durch seine Arbeiten zur automatischen semantischen Textanalyse und Sprachübersetzung sowie als vergleichender Sprachwissenschaftler insbesondere in der Orientalistik. Aus etwa fünfzig Sprachen übersetzte er Fachtexte ins Deutsche. Von 1960 bis 1970 leitete er das Institut für Phonetik und Kommunikationswissenschaft an der Humboldt-Universität. Von 1960 - 1962 baute Meier an der Akademie der Wissenschaften die Arbeitsstelle für Mathematische Linguistik und automatische Übersetzung auf. Seine gegenwärtigen Interessen liegen vor allem auf dem Gebiet der baskischen und kaukasischen Sprachen.

Nova tasko por OUYANG Wendao

Inĝeniero OUYANG Wendao, kiu reprezentas la daŭran ĉinan kunlaborantaron en la redakcio de grkg/Humankybernetik, foriris en la ĉijara aprilo el la Instituto pri Aŭtomatigo por eklabori kiel vicdekano de la fakultato pri komputoscienco kaj informadiko en la Instituto pri Administraj Sciencoj de ACADEMIA SINICA, Beijing (Pekino), P.O.Kesto 3353. (La instituto troviĝas en Huairou, la norda antaŭurbo de Pekino.)

J.C. Palavecino en San Sebastian

Juan Carlos PALAVECINO (nask.1937) fariĝis en la oktobro 1983 asistanta profesoro en la Facultad de Filosofia y Ciencias de la Educacion/ Filosofi eta Hezkuntz Zientzien Fakultatea (Fakultato pri Filozofio kaj Klerigsciencoj) de la Universidad del Pais Vasco / Euskal Herriko Unibertsitatea (Universitato de Vaskio) San Sebastian - Donostia (E). Li realigis kune kun prof.d-ro D. Pedro Gomez Bosque 1977 en Caceres (E) la „Jornados sobre Pedagogia Cibernetica", kiuj finiĝis per interkonsento pri internacia klerigkibernetika kunlaboro helpe de ILo. 1981, post doktoriĝo pri eksperimenta psikologio en la University of Miami (USA), Palavecino aperigis kune kun Rosa Garcia Sanchez la libron „Teoria de la Informacion: Lenguaje y Actitudes Sociales en la Escuela" (Teorio de la Informacio: Lingvo kaj Sintenoj en la Lernejo).

Luisa Kohen katedra profesorino

La „Facultad de Ciencias de la Educación" (klerigscienca fakultato) de la universitato Paraná (RA) alvokis Luisa KOHEN, Buenos Aires, al la nova katedro pri kibernetika pedagogio - la unua tia katedro en Argentinio. Profesorino Kohen estis kunlaborantino de prof. d-ino Catalina Schirber, kiu enkondukis la kibernetikan pedagogion en Argentinion. Dum la pasintaj jaroj prof. Luisa Kohen kreis la kibernetike pedagogian laborgrupon en la Instituto pri Kibernetiko Buenos Aires (direktoro: d-ro Maximo Valentinuzzi) kaj similajn laborgrupojn en la universitatoj de Rosario, de Mar del Plata kaj de Paraná. DAAD (germana akademia interŝanĝ-servo) ebligis al ŝi 1981 trimonatan viziton de la Instituto pri Kibernetiko en Paderborn (D).

Schriftenreihe der AIS eröffnet

Als Beiband 1984 der grkg/Humankybernetik erscheint zusammen mit gegenwärtigem Heft 3/1984 der „Vorkurs zur Prospektiven Bildungswissenschaft" von H.Frank (VIII+126 S., DIN A 5, 2-spaltig, zweisprachig in ILo und deutscher Übersetzung durch den Autor selbst, Ladenpreis DM 29,-, Preis für Bezieher der grkg/ Humankybernetik DM 15,-). Es handelt sich um den ersten Teil eines seit 1976 vorbereiteten, internationalen Lehrwerks „Prospektive Bildungswissenschaft" mit mehr als 30 Autoren, dessen Herausgabe inzwischen zum ersten Projekt der kybernetischen Sektion der Internationalen Akademie der Wissenschaften San Marino (AIS) wurde. Der „Vorkurs" („Propedeŭtiko de la Klerigscienco Prospektiva") stellt daher zu-

gleich den Eröffnungsband der Schriftenreihe der AIS dar. Eine Parallelausgabe des ILo-Originals mit chinesischer statt deutscher Übersetzung wurde bereits an der Pekinger Pädagogischen Universität vorbereitet und soll in wenigen Monaten erscheinen.

Paderborner Novembertreffen '84

Am Mittwoch, 21.November 1984, beginnt das Paderborner Novembertreffen 1984. Es wird in Zusammenarbeit mit verschiedenen wissenschaftlichen und örtlichen Einrichtungen als Jubiläumstreffen zum 10jährigen Bestehen der „Gesellschaft für sprachgrenzübergreifende europäische Verständigung (Europaklub) e.V." von deren deutscher Sektion gestaltet. Vorgesehen sind Einzelvorträge und Expertensitzungen zu drei Schwerpunkten: „Sprache und Kybernetik", „Europäische Kulturpolitik" und „Paderborn und Europa". Bisher stehen Expertensitzungen über automatische Sprachübersetzung (Leitung: Dipl.-Ing. L.Hoffmann) und über Am-Platz-Rechner („personal computers") - Leitung: R.Wiwe) fest. Am Samstag, 24.November, und voraussichtlich noch Sonntag, 25.November klingt das Novembertreffen mit Sitzungen verschiedener Vereinigungen aus, darunter einer außerordentlichen Mitgliederversammlung des Europaklub 1984-11-24 von 16-18 Uhr.

Kontaktadresse: Prof.Dr.Karl SCHICK
Dalheimer Weg 34
D-4790 Paderborn
Tel. (05251-)62590

INTERKIBERNETIK'85 en Budapest

En grkg/Humankybernetik 25, 1/84, p.45 aperis jam la „Call for Papers" (preleginvito) por INTERKIBERNETIK' 85, okazigota en Budapest 1985-07-27/08-02 far NJSZT - Federacio de Teĥnikaj kaj Sciencaj Societoj / Komputoscienca Asocio „Johano Neumann" por TAKIS, kiu respondecos pri la programo. Aldonendas la jenaj informeroj:

1. Kvankam limigo de la manuskriptoj al 5 paĝoj (po ĉ. 1800 skribmaŝinaj signoj) estas dezirata, akcepteblas kontribuoj ĝis maksimume 10 presitaj paĝoj (inkl. la bildojn, la literaturliston kaj 10 - 25 linian resumon en alia kongreslingvo. (Kongreslingvoj estas la Angla, la Franca kaj ILo; okazos tradukoj ILen.) . La teksto nepre devas esti sendita antaŭ 1985-03-31 al la ĝenerala sekretario de TAKIS, d-ro Dan MAXWELL, Technische Universität Berlin, FB 1, Ernst-Reuter-Platz 7, 8.OG, D-1000 Berlin.

2. La decido pri la enprogramigo de ofertita prelego surbaze de la prespreta teksto okazos plej malfrue 1985-05-15. La programkomitato rekomendas sendi duonpaĝan resumon ankoraŭ en 1984, sur kies bazo tuja akcepto kaj oficiala, persona invito eblos.

3. La kongreskotizo estas 200,- DM pagenda al „Speciala konto Kibernetiko de d-ro D.Maxwell" P.K. n-ro 467763-106, poŝtĉeka oficejo Berlin-West, kun indiko „Aliĝo al Interkibernetik' 85", antaŭ 1985-03-31. Aliĝantoj el socialismaj landoj pagu senpere ĝis la sama limdato al NJSZT/H-1368 Budapest, Pf.240 Hungario, pere de Hungara Nacia Banko MNB 232-90171-2494 NJSZT INT. Al la sama konto ĉiuj malfruiĝintaj aliĝontoj ĝiru la pli altan kongreskotizon validan post la 31a de marto, t.e. DM 250,-. La kongreskotizo inkluzivas la prezon de la kongresaktoj, kiuj aperos antaŭ la malfermo de la kongreso.

4. La okazigonto ofertas loĝigon en unupersonaj ĉambroj je DM 80,- nokte, en dupersonaj ĉambroj je DM 60,- nokte. Familianoj de kongresanoj pagu nur por loĝigo kaj elektitaj eroj de la kadra programo: tuttaga ŝipekskurso dum dimanĉo la 28a de julio (DM 35,-) kaj/aŭ urborigardo duontaga la 2an de aŭgusto (DM 15,-). La aliaj programeroj estas senpagaj por aliĝintoj kaj familianoj. Oni aliĝu per letero al D-ro BROCZKO Peter, Sekretario de la Preparkomitato de Interkibernetik' 85, NJSZT, H-1368 Budapest, Pf. 240, Hungario, indikante nomon, adreson, eble mendon de unu- aŭ dulita ĉambro (de kiam ĝis kiam?), eble mencio de akompanaj familianoj, por kiuj samtempe hotelĉambro estos bezonata, eble aliĝon al ekskursoj, kaj nepre la daton, sumon kaj la celkonton de la farita pago. (Aliĝontoj el nesocialismaj landoj bv. sendi kopion al d-ro Maxwell.)

Semiotik-Informationen erhältlich

Dr.Gerd JANSEN, Beirat der Deutschen Gesellschaft für Semiotik (DGS) e.V. - angeschlossen der International Association for Semiotic Studies (IASS) - für den Teilbereich Erziehung, begründete anfangs 1984 eine informelle Form der wissenschaftlichen Kommunikation, die sich schwerpunktmäßig mit Zeichenprozessen in der Erziehung befaßt. (Dabei ist nicht an einen unmittelbaren Schulbezug gedacht, sondern an alle Phänomene, die die Erziehung bzw. die Sozialisation des Menschen betreffen.) Eine Erweiterung des aktiven wie des passiven Teilnehmerkreises ist erwünscht. Es können Aussagen - z.B. auch Seminar- oder Thesen-Papiere - zur Diskussion gestellt und diskutiert werden. Entsprechende Texte stellt Dr.Jansen innerhalb von zwei Monaten nach Erhalt zu einer neuen Sendung zusammen. Die Informationen werden quasi als persönliche Briefe unmittelbar vervielfältigt; die Empfänger können sich so mit den jeweiligen Autoren unmittelbar in Verbindung setzen.

Zur Finanzierung wird das folgende Verfahren praktiziert. Bei jeder Sendung werden die Kopierkosten und das Porto berechnet und mitgeteilt. Nur wenn weitere Sendungen gewünscht werden, ist dieser Betrag in Postwertzeichen mit einem von ihm schon vorbereiteten Kurzbrief an Dr.Jansen zu schicken - andernfalls verbleibt die letzte Sendung beim Empfänger als „Abschiedsgeschenk".

Kontaktadresse: Dr.Gerd JANSEN
Stöteroggestraße 79
D-2120 LÜNEBURG

Erreur en grkg/Humankybernetik 4/83

L' indication des auteurs de l'article „Mesure de la Durée du Présent et du Moment..." en vol.24, cahier 4/83 de notre revue n'était pas complète. Le text correct des 5 lignes après le titre est le suivant:

De Juan Carlos CARENA, Susana FERNANDEZ, Liliana FERRANTI, José Luis FERRETTI, Susana LESPINARD (traduction française), Alicia LUZZI, María del Carmen MASSANA, Alejandra PARDAL, Oscar PLIEGO, Cristina Susana RODRIGUEZ, Francisco SETA, María del Rosario SOLHAUNE, et Beatriz Elena TAMAGNO, Rosario (RA)
de l'équipe de Pédagogie Cybernétique, Université Nationale de Rosario, Argentine (Coordinateur: Prof.Dr.Juan Carlos CARENA)

Raporto de la Iniciatgrupo AIS de Eŭropa Klubo pri la plenumita preparlaboro cele la starigon de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino (Tria parto)

Daŭrigo de la Raporto pri la Unua „Sanmarina Universitata Sesio" (SUS) cele la inaŭguron de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) RSM

La tagon de la malfermo (1983-12-28), posttagmeze eklaboris la provizora Senato de la fondota AIS laŭ invito de reprezentanto de la Iniciatgrupo prof.d-ro H.Frank. Dua Senatkunsido okazis en la ĉeesto de la Ministrino de Klerigado kaj Kulturo, d-rino Fausta Morganti, sabaton la 31an de decembro, senpere antaŭ la silvestra balo. Jen la protokoloj de ambaŭ kunsidoj:

I-a Kunsido de la Provizora Senato de AIS

Merkredon la 28-an de decembro 1983 je la 16-a horo kunvenis en salono Boulanger de la sidejo de SUS laŭprograme la provizora Senato de AIS por diskuti la jenan tagordon:

1. Malfermo
2. Konstato de ĉeesto laŭ la invitlisto (invititaj estas la sciencistoj, kies nomoj estas markitaj per *asterisko en la listo de la programkajero de la Unua SUS, paĝo 13)
3. Decido pri la laborlingvo(j) laŭ §8.4 de la Statutpropono
4. Nomumo de protokolanto(j)
5. Decido pri la formala stato de la ĉeestantaro surbaze de la raporto, rezolucio kaj rekomendoj de la Iniciatgrupo de AIS (vd. GrKG/Humankybernetik, vol. 24, 4/83, paĝoj 182 kaj 192).
   Propono:
   (1) La ĉeestantoj decidas konstitui Internacian Liberan Universitatan Kolegion (I.L.U.K.), kiu transprenas de la Iniciatgrupo AIS de EK la okazigon de la SUS.
   (2) Al la I.L.U.K. apartenu ĉiuj, kies nomoj troviĝas sur la proponlisto p.13 de la SUS-programo; pri aliaj membroj ekestu unuopa decido.
   (3) La I.L.U.K. transprenu provizore ĉiujn jam plenumeblajn taskojn antaŭviditajn laŭ la statutpropono por AIS kaj provizore akceptas ĉi tiun statutproponon kun la ŝanĝoj proponitaj de la Iniciatgrupo - sen akcepti per tio jam ĉiujn detalojn lingvajn.
   (4) I.L.U.K. provizore aplikos de la proponitaj ekzamenregularoj nur la regularon por la docentigo laŭ mallongigita proceduro.
7. Aparteneco al la provizora Senato.
   Propono:
   La kriterio Frank/Pennacchietti estu akceptata. La nuna listo estu voĉlegata; se ekestos far minimume unu ĉeestanto en unuopa kazo dubo, oni kontrolu aŭ, se ne tuj tio sukcese eblas, oni ŝarĝu komitaton aŭ la koncernan sekcion. (Rim.: Laŭ la citita kriterio estis proponitaj kiel fondomembroj en la rango de „honoraj profesoroj kaj dumvivaj sciencaj senatanoj" fare de la Iniciatgrupo per ties rezolucio de la 29a de oktobro universitatnivelaj profesoroj, kiuj „jam verkis science en ILo aŭ aĝas jam minimume 70 jarojn".)
8. Aparteneco al la I.L.U.K. kiel (a) honora profesoro; (b) adjunkto.
   Propono:
   Oni procedu analoge al tagorda punkto 7.
9. Nomumo de sekciestroj
   Propono:
   Por la sekcio 1,Kibernetiko (provizore kunligita kun 4, Filozofio): Frank; por la sekcio 2, Kultursciencoj (provizore kunligita kun 6, Morfosciencoj): Pennacchietti; por la sekcio 5, Natursciencoj (provizore kunligita kun 3, Struktursciencoj): Neergaard.
10. Eldonoj, eldonejo (aŭ eldonista rondo) de la estonta AIS.
    Proponoj:
    (1) La filo de Marina Michelotti transprenu la organizan taskon.
    (2) La unua projekto estu la eldono de kurstekstoj en modela (2-lingva) formo.
11. Videoteko
    Propono:
    Laŭ la modelo de tri kurshoroj de la Paderborna Kibernetika Instituto oni kreu aŭdvidajn bendojn kun aprobo de la sekcioj (fakaroj)
12. Informinterŝanĝo ekster la tempointervaloj de SUS.
    Propono:
    Oni serĉu „oficialajn organojn", kiuj estas aboneblaj kaj pretas disponigi lokon por

(daŭrigo: paĝo 133)

Raporto de la Iniciatgrupo AIS (daŭrigo de paĝo 132)

    novaĵoj de AIS. Jam estas je dispono tiucele GrKG/Humankybernetik.
13. Financplano
    Propono:
    La plano Neergaard estu diskutbazo. Oni petu la opinion de la Provizora Konsilantaro, kreu komitaton kaj prezentu solvon al la Asembleo.
14. Kunlaborintereso de „Maison Internationale des Intellectuels" (M.I.D.I.)
15. Helpo al kolegoj el nepagipovaj landoj.
    Propono:
    Oni kreu „solidarecan kason".
16. Diversaĵoj.

Ĉeestas la provizoraj senatanoj Frank, Lapenna, Marinov, Mužić, Neergaard, Pennacchietti, Popović. Je la 17-a horo eniras la salonon kolego Hászprá. Je la 18:30 eniras la salonon kolego Meszaros. Prezidas kolego Frank.

(1) La kunsidon malfermas kolego Frank kaj donas bonvenan saluton al la ĉeestantoj.

(2) Oni konstatas la ĉeeston de la supre menciitaj kolegoj surbaze de la invitlisto.

(3) Oni decidas unuanime alpreni kiel laborlingvon, laŭ §8.4 de la provizora statuto de AIS, nur la Internacian Lingvon, ĉar ĝi estas scipovata de ĉiu ceestanto.

(4) Oni nomumas kiel protokoliston kolegon Pennacchietti.

(5) Oni ne proponas programajn ŝanĝojn en la tagordo.

(6) La ĉeestantoj unuanime decidas konstitui *Internacian Sciencan Kolegion (ISK)*, kiu provizore aplikos, de la proponitaj ekzamenregularoj, nur la regularon por la docentiĝo laŭ mallongigita proceduro. La membraro de ISK estas alvokenda.

(7) Oni voĉlegas la liston de la provizoraj Senatanoj proponitaj laŭ la kriterio Frank/Pennacchietti, listo kiu aperas sur paĝo 13 der la SUS-programo. Sur ĝi la nomoj de la proponitaj kolegoj estas markitaj per asterisko. Ekestas dubo pri la plenumiteco de la menciita kriterio kaze de la kolegoj Mattos, Støp-Bowitz kaj Szerdahelyi. Post longa diskuto oni decidas tuj akcepti en la liston la kolegojn Mattos kaj Støp-Bowitz kaj prokrasti la decidon kaze de kolego Szerdahelyi*.

(8) a) Oni voĉlegas la liston de la kolegoj enlistigitaj sur p.13 sen asterisko kaj ne inter krampoj. Kolego Lapenna kontestas la oportunecon de la termino „honoraj profesoroj". Kiel universitataj profesoraj membroj de ISK estos rigardataj ĉiuj kolegoj aperantaj en la listo ne inter krampoj.
b) Oni voĉlegas la liston de la adjunktoj. (Ties nomoj estas listigitaj inter krampoj en p.13 de la SUS-programo.) Ne estas kontraŭstaro.

(9) Oni unuanime nomumas provizoraj sekciestroj kolegon Frank* por la sekcio 1(kun4), kolegon Pennacchietti por la sekcio 2(kun 6) kaj kolegon Neergaard por la sekcio 5(kun 3).

(10) Oni estas favoraj al la starigo de eldonista rondo kaj oni decidas interesigi al la afero la filon de S-ino Marina Michelotti, kiu estas eldonisto en San Marino, kaj prof.d-ron Costantino Dragan, posedanto de la eldonejo Nagard en Milano.

(11) La ĉeestantoj aprobas la ideon.

(12) Kolego Frank informas, ke la revuo *GrKG/Humankybernetik* estas preta, kiel ĝi jam faris, sciigi sian legantaron pri la disvolvo de la aktivecoj de AIS kaj ĝiaj programoj, en la periodo ekster la SUS-intervaloj. Oni decidas peti la saman servon de la revuoj *Eŭropa Dokumentaro* kaj *Civilta Cibernetica.**

(13) La propono estas aprobata.

(14) Oni decidas prokrasti la diskuton pri eventuala kunlaboro kun M.I.D.I.

(15) Eliras kolegoj Marinov kaj Meszaros. Kun 6 favoraj voĉoj kaj 1 sindeteno oni decidas krei „solidarecan kason", sed nur okaze de tiu ĉi sesio de SUS, por ebligi la partoprenon de la kolegoj el nepagipovaj landoj. Por la venonta SUS oni devos trovi alian solvon.

(16) Oni unuanime esprimas sin favore al invito al Inĝ. A.Casali, direktoro de la Sanmarina Kibernetika Instituto kaj membro „ex officio" de la Senato de AIS, por ke li parolu dimanĉon, la 1-an de januaro 1984 je la 20a horo okaze de la *Publika prezentado de la proponita kolegio de AIS.* Oni plie invitas Inĝenieron Casali ĉeesti en la dua kunsido de la provizora Senato sabaton la 31-an de decembro 1983 je la 20-a horo.

La kunsido fermiĝas je la 19-a horo.

La protokolanto: F.A.Pennacchietti.

(daŭrigo: paĝo 134)

Raporto de la Iniciatgrupo AIS (daŭrigo de paĝo 133)

II-a Kunsido de la Provizora Senato de AIS

Sabaton, la 31-an de decembro 1983 je la 20-a horo kunvenis ĉe la hotelo „La Grotta“ la Provizora Senato de AIS por diskuti la jenan tagordon:

1. Konstato de ĉeestanteco.
2. Laborlingvo(j) por la kunsido; nomumo de (tradukistoj kaj) protokolanto(j)
3. Akcepto de la protokolo de la I-a kunsido.
4. Eventualaj ŝanĝoj de la tagordo.
5. Raportoj (protokoloj) pri la sekcikunsidoj.
6. Kunlabor-oferto de ADJ. Hübner, Dr.med., prezidanto de Ludwig-Wittgenstein-Gesellschaft, realigi komunan seminarion en 1984-08-16/25 en Kirchberg am Wechsel (A)
7. Informado. Oficialaj organoj.
8. Elekto de la prezidiumo laŭ §5.7-8.
9. Budĝeto kaj laborplano 1984; docentigoj.
10. Agnosko fare de la Respubliko San Marino.
11. Diversaĵoj.

(1) Ĉeestas la kolegoj Frank, Lapenna, Popović, Pennacchietti, Hászprá, Meszaros, Mužić, Schick (Deĵoranta Senatano laŭ §5.6 de la Statutpropono), Quednau (Deĵoranta Senatano laŭ §5.6), Weltner, Szerdahelyi, Marinov, Neergaard; ĉeestas ankaŭ la ministrino de klerigo kaj kulturo, d-rino Fausta Morganti; entute 14 ĉeestantoj.

(2) Oni decidas unuanime alpreni kiel laborlingvojn la Italan kaj la Internacian kun reciproka traduko. Kiel protokolanton por ambaŭ lingvoj oni nomumas kolegon Pennacchietti.

(3) Kolegeo Pennacchietti voĉlegas la protokolon de la I-a kunsido rekte tradukante ĝin en la italan lingvon. La protokolo estas akceptita.

(4) Oni decidas prokrasti al III-a kunsido la tagordajn punktojn (5), (6) kaj (7) kaj anticipi la diskuton de punktoj (10) kaj (9).

(10) Deputito d-rino Fausta Morganti, demandite kiam, laŭ ŝiaj konjektoj, okazos la oficiala agnosko de AIS fare de la RSM, respondis ke, en la komenca provizora fazo, necesas konservi kunligon kun la Instituto pri Kibernetiko de San Marino. Ŝi intencas proponi al la Registaro ke ĝi formale konstatu la ekziston „de facto“ de la Akademio kaj de ties statuto. Laŭ ŝi la etapo de la konstato fare de la Registaro povas plenumiĝi jam post kelkaj semajnoj. Intertempe ŝi intencas prezenti leĝprojekton al la Parlamento por agnosko de AIS. Laŭ ŝiaj antaŭvidoj la agnosko okazos post kelkaj monatoj. Ŝi informis ke ŝi ĵus ricevis la leteron de la magistrato de unu el la naŭ komunumoj de RSM, kiu sciigas, ke tiu magistrato decidis disponigi ekskamparan domon (biendomon), ĵus restaŭritan, kiel sidejon por AIS. - Jam en la fazo antaŭ la oficiala agnosko kaj post la formala konstato fare de la Registaro, la Deputito promesas zorgi pri starigo de sekretaria servo por AIS.

(9) Demandite pri la estonta budĝeto de AIS, la Deputito Fausta Morganti certigas ke, se, kiel ŝi antaŭvidas, la Sanmarina parlamento baldaŭ agnoskos pere de aparta leĝo la Akademion, la Registaro kreos apartan budĝeton por ĝi. - Pri la laborplano kaj docentiĝoj raportos la dekanoj de la tri sekcioj okaze de la publika prezento okazonta dimanĉon la unuan de januaro 1984 je la 20-a horo.

(8) Laŭ propono de kolego Frank, por la kreo de la Prezidiumo estas konsilinde sekvi la preskribojn de la provizora statuto de AIS (§5.8), laŭ kiu la Prezidiumo estu tripersona kaj ĝin konsistigu du civitanoj de RSM kaj unu eksterlandano. - Konforme al la statuto, la Senato konstatas, ke nur la Deputito pri Klerigo kaj Kulturo, d-rino Fausta MORGANTI, estas la reprezentanto de AIS antaŭ la sanmarinaj aŭ internaciaj instancoj. La Deputiton anstataŭu en tiu rolo persono de ŝi elektita, se eble la Sanmarina Ambasadoro ĉe UNESKO. D-rino F.Morganti akceptas. - La Senato elektas unuanime kiel Kancelieron (Ĝeneralan Sekretarion) prof-on Aureliano CASALI en foresto, kiu reprezentu AIS-on en juraj kaj administraciaj aferoj. (Post la kunsido prof.Casali akceptis.) - Koncerne la elekton de la Prezidanto de AIS, nome de la reprezentanto de AIS en la scienca mondo, kolego Lapenna rimarkigas la oportunon de elekto de kolego perfekte scipovanta la Italan. La Senato elektas kun du sindetenoj kolegon PENNACCHIETTI kiel Prezidanton de AIS. Kolego Pennacchietti akceptas. - Kolego Frank proponas, ke oni elektu la du Vicprezidantojn, kiuj laŭ la provizora statuto anstataŭu la Prezidanton kiam li tion postulas, en la personoj de kolego NEERGAARD kaj de kolego MUŽIĆ. Male kolegoj Neergaard kaj Pennacchietti proponas, ke oni elektu kiel Vicprezidantojn kolegon Frank kaj iun alian kolegon. Tiam kolego Frank deklaras, ke li ne scipovas la italan lingvon. Por lin konvinki akcepti la kandidatigon, kolego Neergaard retiras sian kandidatecon. Tiam la provizora Senato elek-

(daŭrigo: paĝo 135)

Raporto de la Iniciatgrupo AIS (daŭrigo de paĝo 134)

tas kiel Vicprezidantojn (1) kolegon Frank* (kun du sindetenoj), (2) kolegon Mužić (kun du sindetenoj). - Laŭ propono de kolego Szerdahelyi, la Senatanoj esprimas al kolego Frank koran dankon pro la bonega kaj sukcesoplena laboro kiun li kun granda fortostreĉo kaj personaj elspezoj jam plenumis.

(11) Neniuj diversaĵoj estas pritraktataj.

La kunsido finiĝas je la horo 21:3o.

La Protokolanto: F.A.Pennacchietti

**Rimarkigoj:*
Inter la unua kaj la dua kunsido de la provizora Senato okazis sekcikunsidoj, dum kiuj i.a. estis neniigita la dubo pri plenumiteco de la kriterio Frank/Pennacchietti fare de prof.d-ro Szerdahelyi kaj elektitaj la provizoraj dekanoj laŭ la proponoj de la Senato krom en la sekcio 1(kun 4), kie oni sekvis la proponon de kolego Frank elekti kolegon Mužić.
Post interkonsiliĝo kun d-rino F.Morganti kolego Frank per letero al la provizora Prezidanto, kolego Pennacchietti, oficiale retiriĝis 1983-01-02 kiel provizora vicprezidanto, por ke kolego Neergaard kiel dekano de la plej granda sekcio rolu kiel vicprezicanto apud kolego Mužić, kaj por ke li mem restu dum la provizora stato je dispono kiel gvidanto de la prepara Iniciatgrupo.
Krom grkg/Humankybernetik ankaŭ du aliaj revuoj poste ofertis regule publikigi ĉiujn sciigojn pri AIS, nome „La Mevo“ kaj „Rivista del Instituto de Cibernetica“.

I-a Kolegi-Kunsido de la Sekcio(j) 1(4)

Ĵaŭdon, la 29an de decembro 1984 kunvenis je la 15a-18a horoj en salono Schmidt laŭprograme la Sekci-kolegio de la Sekcio 1, Kibernetiko (provizore kun 4, Filozofio) por diskuti la jenan tagordon (kiu estis proponita al ĉiuj sekcioj):

1. Malfermo
2. Konstato de ĉeesto laŭ la invitlisto
3. Decido pri la laborlingvo(j) laŭ §8.4 de la Statutpropono
4. Nomumo de protokolanto(j)
5. Decido pri eblaj ŝanĝoj de la tagordo
6. Strukturo de la sekcio.

Propono:
Antaŭ la formala oficialiĝo de AIS ne estu tuŝata la proponita subdivido de la sekcio en fakaroj (subsekcioj) laŭ paĝo 12 de la SUS-programo (=apendico 4 de la Statutpropono). Sed mis-enordigitaj kolegianoj povas kun ilia aprobo esti transmetataj en alian fakaron.

7. Nomumo de provizoraj kunsid-gvidantoj por la ekfunkciantaj fakaroj el inter la apartenantaj kaj ĉeestantaj membroj de la provizora Senato.
8. Decido pri la aparteneco kiel fondo-membroj de kromaj sciencistoj, kiuj sendis informilon aŭ eĉ persone ĉeestas SUS-on
9. Docentigoj laŭ mallongigita proceduro
10. Projektoj de scienca kunlaborado en la sekcio
11. Elekto de la provizora dekano kaj de deĵorantaj senatanoj laŭ §5.6 de la Statutpropono
12. Diversaĵoj.

(1) Prof.Frank malfermas la kunsidon kaj bonvenigas la partoprenantojn.
(2) Ĉeestas: profesoroj Frank kaj Mužić; ged-roj Angstl, Hübner, Pagliarani, Lzowicka-Stupnicka.
(3) Sola laborlingvo por tiuĉi kunsido estas ILo.
(4) Protokolas Angstl.
(5) La proponita subdivido ne estu ŝanĝata. D-ro Pagliarani transiras de 4.1 al 4.2 (valorteorio).
(7) La sola memstara fakaro de la sekcio restas 1.1 (antropokibernetiko). Oni aprobas la proponojn de la Iniciatgrupo de 1983-10-29 rilate §§5.1 kaj 9.3 de la Statutpropono.
(8) D-ro R.J.Fischer kaj E.A.Minguez, prof., estas envicigitaj ambaŭ en 1.3 kiel adjunktoj.
(9) Ne okazu dum la Unua SUS docentigo en la sekcio(j) 1(4).
(10) Unua projekto estu la internacia instruverko „Prospektiva Klerigscienco“. Krome oni volas aranĝi dum aŭgusto 1984 en Kirchberg (A) seminarion pri filozofiaj aspektoj de universalaj lingvoj kune kun la Wittgenstein-societo.
(11) Prof.Mužić estas elektita kiel provizora dekano. La Sekci-kolegio ne elektas deĵorantan senatanon.
(12) Neniu diversaĵoj estas pritraktataj.

La Protokolanto: H.Angstl

(daŭrigo: paĝo 136)

Raporto de la Iniciatgrupo AIS (daŭrigo de paĝo 135)

(daŭrigo de paĝo 135)

Aktuala stato laŭjura de AIS

Al germanlingva, instrukcipeta letereto la Ministrino de Klerigado kaj Kulturo, Fausta Morganti, respondis - kun kopioj informcele senditaj al la ges-oj Marina Michelotti, A.Casali kaj F.Pennacchietti - en la Itala jene:

REPUBBLICA DI SAN MARINO
Dicastero Pubblica Istruzione,
Cultura e Giustizia
La 4an de septembro 1984/1684 pfR
Protokolo n-ro 693-84-P

Al
Prof.d-ro Helmar Frank
Paderborn

Tre estimata Sinjoro Profesoro,
Sekve al via komunikaĵo de la 9a de aŭgusto 1984 mi deziras vin informi pri la iniciatoj de la registaro koncerne ankaŭ la starigon de la Akademio de la Sciencoj en San Marino.
La Akademio devos trovi sian juran pozicion en la kadra leĝo pri la universitata instruado, kiun la ministerio nun pretigas. En tiu framo oni konformigos la proponitajn skizojn de statuto al la ĝeneralaj principoj de la kadra leĝo. Plenuminte la procedurojn, oni povos doni oficialecon al la iniciato de vi proponita, kiu jam trovis favoran akcepton flanke de San Marino.
Kun la plej koraj salutoj
La Deputito: Fausta Morganti

Prof.d-ro Frank respondis kun dato 1984-09-14 en la Germana jene:

Tre estimata Sinjorino Ministrino,
Surbaze de via letero de la 4a de septembro 1984/1684 pfR, pro kiu mi tre dankas vin, mi vidas koncerne la Akademion Internacian de la Sciencoj momente jam tri faktojn:

1. *Via propono starigi Akademion Internacian de la Sciencoj (AIS) estis principe jam aprobita la 19an de majo 1983/1682 pfR fare de la Ŝtata Kongreso; via leĝpropono estas la siatempe petata plikonkretigo.*
2. *La Iniciatgrupo AIS de Eŭropa Klubo realigis sub mia gvidado intertempe preparlaborojn, pri kiuj estis interparolite inter vi kaj mi la 11-an de julio 1983/1682 pfR en San Marino; precipe ĝi prezentis la 31-an de oktobro 1983/1683 pfR statutproponon kaj liston de alvokindaj sciencistoj, kaj ĝi organizis la unuajn Sanmarinajn Universitatajn Semajnojn cele la inaŭguron de la Akademio.*
3. *La sciencistoj, kies alvoko en la Akademion estis proponita, konstituis la 28an de decembro 1983/1683 pfR - unue sen plia jura bazo en San Marino - la Internacian Sciencan Kolegion (ISK), por enhave realigi la Universitatajn Semajnojn kaj esti je dispono por estontaj interkonsiliĝoj; propra iniciate ISK laboras laŭ la menciita statutpropono de la Iniciatgrupo AIS de EK kaj sekve elektis al si - en via ĉeesto - la 31an de decembro 1983 /1683 pfR profesoron d-ron Pennacchietti prezidanto.*

Dokumentaro pri ĉi faktoj troviĝas en la kajeroj 2/83 ĝis 3/84 de grkg/Humankybernetik; kopio aldonitas.
Mi ĝojas ke mi povas konkludi el la ricevontaro de via letero, ke vi konsideras la komitaton starigitan je la fino de la Universitataj Semajnoj en San Marino (konsistanta el vi mem, la kolegoj Casali kaj Pennacchietti, s-ino Marina Michelotti kaj mi) taŭga instanco por plua interkonsiliĝo post la akcepto de la leĝpropono. Por certigi vastan aprobon en la scienca mondo mi estas proponinta al kolego Pennacchietti, okazigi prie kunsidon de ISK la 24an de novembro 1984, je la horo 9:00, - dum la Paderborna Novembra Renkontiĝo.
Mi deziras al vi kaj al ni sukceson okaze de la pritrakto de via leĝpropono.
Plej altestime
Prof.d-ro Helmar G.Frank

Kopie al la komitatanoj
s-ino Marina Michelotti,
prof.inĝ. Casali, prof.d-ro Pennacchietti

*

Invito al ĉiuj membroj de la Internacia Scienca Kolegio (IKS) proponita por AIS

Prof.d-ro Pennacchietti en sia kvalito de prezidanto de ISK - t.e. provizora Prezidanto de la fondota AIS - telefone sciigis diskonigcele 1984-09-13 la redakcion de grkg/Humankybernetik, ke interkonsiliĝo de la membroj de ISK okazu en Paderborn, sabaton 1984-11-24 ek de la 9-a horo en „Gutshof", Bahnhofstr. 17 (apud la ĉefstacidomo).

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble prespretе aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.